



4*86

>115<


starto

ORGANO DE
ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



STAVEBNICE PODVOZKU NÁKLADNÍHO PŘÍVĚSU

AK-2P



Obsahuje tyto díly:

x	náprava	990,- Kčs
x	oj	120,- Kčs
x	podpěra	20,- Kčs
x	pojistné zařízení	59,- Kčs
x	2 ks třmen (ò A 12,50)	25,- Kčs
x	2 ks blatník vč. zdstěrek (ò 85,-)	170,- Kčs
x	nosník K 1000/0	250,- Kčs
x	2 pneu B Scooter 4x8 (ò 105,-)	210,- Kčs
x	2 duše (ò 15,-)	30,- Kčs
x	2 disky 2,45x8" — typ A / (ò 225,-)	450,- Kčs
x	2 hřídele (ò 130,-)	260,- Kčs
		2 584,- Kčs

	Montáž podvozku	148,50 Kčs
	(s vydáním tech. průkazu)	
	Celkem cena	2 732,50 Kčs

x	úhelníkový rám korby	310,- Kčs
x	ocelová korba	1 300,- Kčs
x	oj s nosníky jen pro ocel. korbu	390,- Kčs

Technické údaje:

váha (bez korby)	cca	50 kg
ocelková hmotnost		400 kg
užitečné zatížení		320 kg
max. šířka		1 500 mm
délka		2 500 mm
výška		730 mm

Podvozek nákl. přívěsu AK-2P je bez elektrické instalace (zatím není dodáván panel pro tabulku SPZ vč. svítílen) a bez korby, která je v návrhu pro výrobu.

Na podvozek nákl. přívěsu AK-2P je nutno uvážít písemnou objednávku. Formuláře objednávek vyžádejte na: INKLEMO VD, 100 00 Praha 10, Třebohostická 3, tel. 78 14 749. Dodací lhůta podvozku (vč. montáže) je závislá na přijatém počtu objednávek. Zákazník bude písemně vyzván k osobnímu odběru.

Jednotlivé díly stavebnice označené x budou samostatně v prodeji výhradně v prodejních
VD INKLEMO — Praha:

Praha 1, Skořepka 8	telefon: 26 68 24
Praha 2, Bělehradská 128	22 95 31
Praha 4, nám. Hrdinů 5	43 54 65
Praha 7, Dukelských hrdinů 4	87 80 16
Praha 8, Sokolovská 170	82 04 81
Praha 9, Sokolovská 201	83 14 24

Na tyto díly nebudeme přijímat objednávky, ani nebudou zasílány na dobírku (s výjimkou litinového nosníku K 1000/0).

Výrobek byl kladně testován (vč. podrobného popisu) v časopise SVĚT MOTORŮ č. 34/1983.

Inklemo Praha



Jiří KOŘÍNEK



La elstara Esperanta poeto Jiří Kořínek fariĝis 80-jara. Li naskiĝis la L-an de oktobro 1906 en Liberec. Profesie li estis kvalilkontrolisto en ŝtata teksvara pogrاندkomerco; de post la jaro 1975 li estas emerito. Esperanton li ekstudis en 1922 en porskolta kurso kaj iĝis membro de Esperanto-grupo Estonteco en Liberec. En periodo 1931-1964 li vivis en Brno, de post tiam en Ústí nad Labem. Sur la Esperanta literatura kampo li aktivis ekde 1949.


Jiří Kořínek estas rekonata tradukanto de la ĉeĥa kaj lastatempe ankaŭ slovaka poezioj. En lia traduko prese aperis en 1960 PANJO (Mařinka) kaj en 1956 KRONPLEKTO DA SONETOJ (Vě nec sonetů), ambaŭ poemaroj de Jaroslav Seifert. Kunlabore kun T. Pumpr kaj R. Hromada li tradukis SILEZIAJN KANTOJN (Slezské písně) de Petr Bezruč, eldonitaj de ĈEA en 1970. Grave li kunlaboris ĉe tradukado de SLOVAKA ANTOLOGIO aperinta en 1977 en la slovaka ŝtata pedagogia eldonejo. En 1985 aperis en Brazilo poemaro de J. Karen FLUGILHAVÁ ŠTONO (Okřídlený kámen) kaj en 1986 ĉe la sama eldonejo en Brazilo poemaro de la juna ĉeĥa poetino Markěta Procházková SUR LA SOJLO DE LA AMO (Na prahu lásky); ambaŭ poemarojn tradukis Jiří Kořínek. Okaze de la Nobel-premiigo de naciartisto Jaroslav Seifert aperis speciala numero de la brazila literatura revuo Fonto, kiu alportis al siaj legantoj specimenaĵn tradukojn el la poezio de la premiito el la tradukista plumo de Jiří Kořínek.

En la manuskripto restas versdramo MANON LESCAUT de Vítezslav Nezval, la porinfana poemaro de Karel Václav Rais BEŠTEJOJ KAJ HOMOJ (Zviřátka a lidé), KANTO PRI VIKTORKA (Písen o Viktorce) kaj VENTUMILO DE BOŽENA NĚMCOVÁ (Vějíř Boženy Němcové), ambau poemaroj de Jaroslav Seifert, NIA SINJORINO BOŽENA NĚMCOVÁ (Naše paní Božena Němcová) de František Halas, SERČADO DE LA BLUA TONO (Hledání modrého tonu) de Jiří Karen, antologieto el la verkaro de Otokar Březina (kune kun T. Pumpr) kaj konsiderinda kvanto da unuopaj tradukoj el diversaj Ĝenaj aŭtoroj. Admirinda estas ankaŭ listo de liaj muziktekstaj tradukoj nombranta centojn da operarioj kaj klasikaj kantoj, kiuj estas eluzataj por Esperantaj kulturaj solenaĵoj. Inter ili troviĝas kompleta traduko de opero JAKOBENO (Jakobín) kaj kantociklo BIBLIAJ KANTOJ (Biblické písně) de Antonín Dvořák.

Malpli konata, bedaŭrinde, estas la originala poezio de Jiří Kořínek, kvankam ĝi ampleksas kelkcentojn da poemoj distingiĝantaj per perfekta verstekniko, sonorriĉa Esperanto kaj vasta paletro de temaro. Pluraj el ili atingis premiigon en Belartaj konkursoj. Specimenojn el lia originala poezio prezentas Esperanta Antologio de W. Auld (1958), Belarto de UEA, Norda Prismo, La nica literatura revuo ka. Literatura almanako de Starto "Panoramo" alportis en 1976 kvindekono da liaj originalaj poemoj sub titolo VITREROJ. La ampleksa originala poemo de J. Kořínek DOKTORO ZAMENHOF aperis 1960/61 en Norda Prismo. En poemaro SKIZOJ DE USEDOM, kiujn eldonis EK en České Budějovice en 1980, troviĝas originalaj versoj de Jiří Kořínek, kiujn li rikoltis dum sia dumonata deĵorrestado en 1979 sur la insulo Usedom en GDR.

Omaĝe al Jiří Kořínek la Esperanto-Klubo en Ústí nad Labem aranĝis fine de septembro 1986 Kulturfestivalon, en kiu estis prezentita programo el literaturaj verkoj de Jiří Kořínek, en artisma prezento de Eva Seemannová, kaj operarioj tradukitaj de Jiří Kořínek en plenumo de Miroslav Smyčka kaj aliaj solistoj de la operteatro en Ústí nad Labem.

V. N.



Sur la koverto: Monthotelo " Ještéd ", konstruita proksime de nordbohemia urbo Liberec.

UEA kongres ve Varšavě 1987 !

V současné době se jedná s cestovní kanceláří ČEDOK o možnosti uspořádat zájezd do Varšavy na kongres v roce 1987. Vzhledem k tomu, že je nutno do konce roku 1986 zaplatit kongresový poplatek, žádáme zájemce o tento zájezd, aby si napsali do sekretariátu o poštovní složenku, kterou do konce letošního roku uhradí zálohu 1000.- Kčs. Ostatní podrobnosti budou následovat.

VK

LA REĜLANDO DE HURVÍNEK

Jiří Procházka

/Pasinteco kaj nuntempo de nia pupteatro/

La scioj pri la pasinteco kaj historio de la ĉeĥa pup-arto kutime komencigas kaj finiĝas per la nomo de Matěj Kopecký. Sed tiamaniere estas nia puparta estinteco malriĉigata. Matěj Kopecký estis ne la unua kaj plie nur mezvalora marionetisto. Antaŭ li kaj apud li funkciis ne sole unuopaj marionetistoj, sed tutaj marionetistaj dinastioj, pri kiuj ni bedaŭrinde scias tre malmulte, propre nur tion, kion restigis koncizaj oficaĵaj notoj. Konataj estas ekzemple la pupteatraj familioj de Dubský, Kočka, Tříška, Kopecký, Maizner kaj aliaj. Restis do nur areto da nomoj kaj dankema tradicio, kiu ekde la mezo de la 19-a jarcento konstruis imaginaran monumenton de naciirenesancaj marionetistoj pere de la duonhistoria kaj duonlegenda portreto de Matěj Kopecký. Ekde la antikvaj tempoj havis en nia lando hejmrājton la pupoj bastonetaĵ kaj stangetaĵ kaj ankaŭ gentaĵ. Kaj ĉi tiun hejman pupartan tradicion forpulis malantaŭen, preskaŭ al forgeso, la alveno de marionetoj, kio estas pupoj movataj de supre per draĵoj aŭ fadenoj.

Estiĝo de la ĉeĥa marionetarto datigas je komenco de la dua duono de la 18-a jarcento. Ĝis tiu tempo funkciis en nia lando sole eksterlandaĵ marionetistoj. Sed la ĉeĥan marionetarton trafis jam komence de ĝia evoluo fatala sorto. Dum la fremdlandaĵ marionetistaj grupoj sukcesis defendi almenaŭ iom la pozicion de artistaj societoj, la hejmaj marionetistoj baldaŭ falis en staton de nomada etkomercista nacieto. Ili venis en zorgoplenan medion, en kiu jam longe ankris niaĵ gantpupistoj. Sed ankaŭ al tiuj la foira tumulto ne multe utilis. La repertuaro degeneris, tekstoĵ mallongigis, fine restis nur primitivaj scenoj. Prave oni nun nomas tiujn scenojn "ĉerkado"; ĉar grava rekvizito en ili estis ĉerko, en kiun Fulcnelo fine enfermis ĉiujn mortbatitajn malamikojn, precipe diablojn kaj skeletulojn. La marionetistoj avantaĵis, ke ili povis prezenti siajn spektaklojn en gasteĵej salonoj aŭ en budoj, tial ili ne dependis tiom de pilgrimfestoj kaj jarfoiroj. Tamen ilin ankaŭ premis la severa ofica praktiko, kiu konsideris kaj traktis la marionetistojn kiel nomadojn, kio estis kategorio tre proksima al vagabondoĵ, almozuloĵ kaj aliaĵ suspektindaĵ elementoj. El ĉiuj privilegioj de teatra profesio restis al tia marionetisto nur unu sola: li havis ĉevalon kaj povis sur kvarrada veturilo transportadi la tutan sian fonduson. La pli riĉaĵ havis eĉ veturilon kun duopa baŝo /ŝirmtuko/. Niaĵ marionetistoj dependis precipe de la kamparo kaj devis limigi sian agadon por la periodo inter fino kaj komenco de la kamplaboroj. Tium fakton spegulis ankaŭ la programoj. Ĉe ĉiu teatraĵo oni postulis aldonon, en kiu rolis stamfisto /=piedbatanto/, marioneto kun etendebila korpo kaj peza lignobloko anstataŭ kruroj. Prezentataĵ estis ankaŭ diversaj akrobataĵ scenoj kun marionetoj.

La marionetarto iom-post-iom kreskis en sistemon de primitivaj nomadaj amuzoj, perdadis la lastajn trajtojn de sia origina kaj kreiva misio. Niaj marionetistoj transprenadis de siaj fremdlandaj antaŭuloj repertuaron kaj plie ili ankaŭ klopodis fari el marionetado miniaturan aktoran scenejon. Ĉi tiu koncepto por longa tempo misinfluis la sanan evoluon de la ĉeĥa puparto, sed samtempe montriĝis, ke tia dependeco de aktora modelo povas havi ĉe certaj cirkonstancoj eĉ sian pozitivan flankon. Kiam komence de la nacia renesanco la malfacile naskiĝanta ĉeĥa aktora teatro absolute ne sukcesis kontentigi la bezonojn de la plej grandaj centroj, ne parolante pri malgrandaj urboj kaj vilaĝoj, tiam la marionetistoj plejparto de tiu mision, kvankam pli senvole ol konscie. Kaj laŭvere dirite, ĝuste tiu renesanca misio por kelke da jardekoj helpis al niaj marionetistoj venki daŭreman internan krizon. Post la revolucia jaro 1848, kiu finplenumis la naĉian renescon, la popolaĵ marionetistoj nomadis plue tra ĉeĥa kamparo, sed iliaj repertuaro kaj aktoredmaniero jam komencis malproksimiĝi de la evoluo de la centra nacia kulturo. La marionetistoj iom-post-iom perdadis la plenkreskulan publikon kaj celis al la publiko infana. La procedo daŭris multajn jardekojn kaj estis finita nur en la 20-a jarcento.

La plej elstara marionetisto de la dua duono de la 19-a jarcento estis Jan Nepomuk Laštovka, celkonscia patrioto, kiu hevis multnombrajn konfliktojn kun aŭstria aŭtoritatoj. Sistempe li estis unusola marionetisto, kiu verkis proprajn pupteatraĵojn aŭ preparis dramajn tekstojn. Li verkis kelkajn pupteatraĵojn pri la husena epoko kaj efike kontribuis al la plifortigo de la nacia sentado. Liajn pupteatraĵojn poste aktoredis ankaŭ aliaj popolaĵ marionetistoj. La repertuaro de nomadaj pupaktoroj iom-post-iom ŝanĝiĝis, **anstataŭ teatraĵoj pri kavaliroj kaj rabistoj** oni komencis pupaktori verkojn de Josef Kajetan Tyt, Svatopluk Ĉeĥ kaj Alois Jirásek /Lanterno/.

Ekde la mezo de la 19-a jarcento estas intereso pri la marionetado rimarkebla ankaŭ inter artistoj, publicistoj aŭ aliaj kleruloj, kiuj devenis el kamparo kaj konis la nomadan marionetan teatron de sia propra sperto. La intereson ĝluzis la eldonistoj kaj komencis eldonadi marionetajn teatraĵojn. La populareco de la marioneta teatro kondukis ne sole al intereso pri la tradiciaj marionetistoj, sed ankaŭ al agema amatora aktiveco. La familiaj teatroj plivastiĝis. Speciale en artistaj familioj estigadis scenejetoj, kiuj pupaktoris por konsiderinde granda infana publiko. Ekzemple dum la sesdekaj jaroj ĉirkaŭ la scenejeto en la familio de la kunfondinto de Sokol /gimnastik-asocio/, Jindřich Fagner, amasiĝis ankaŭ familioj de konataj verkistoj kaj politikistoj. Ankaŭ la fama aktoro Eduard Vojan memfabrikis teatreton por siaj filinoj. Tiaj ekzemploj estis multaj. La ŝatado de marionetetoj en familioj estis unu el radikoj de granda evoluo de la societa amatora marionetado. Nome, la patroj ofte trovis en ĝi sian ŝatokupon kaj kungrupiĝinte kun aliaj amatoj, formis regule teatrantan kolektivon. Multaj favoratoj ekkomprenis, ke la marionetan erton eblas uzi ankaŭ por ali-

aj celoj. Antaŭ ĉio por edukado al patriotismo, al moralo kaj al aliaj edukendaĵoj. La marionetado fariĝis vasta movado kaj plej satata infana amuzo, kiu baldaŭ penetris ankaŭ en lernejojn. La repertuaro komencis ŝanĝiĝi, ĉar la tradicio popola, destinita origine al plenkreskuloj, kontentigadis nek laŭteme, nek laŭlingve kaj memkomprene ĝi kontraŭstaris al pedagogiaj celoj.

La situacio necesigis kreon de nova tipo de teatraĵoj. Pli poste aperis ankaŭ la tiel nomata fabelo moderna. La fabelo genro ekregis la tutan amatoran repertuaron kaj fariĝis eĉ la fundamenta kolono de la moderna dramaturgio.

Komence de la 20-a jarcento la amatora pupteatro kreskis kvante plu. Aperis klopodoj pri ĝia organiza unuigo. La movado splitiĝis en du direktojn, el kiuj unu intencis daŭrigi kaj plu evoluigi la nacireneŝancan tradicion, dum la alia konsideris ĝin superita kaj serĉis novajn vojojn al la infana spektanto. La disputo inter la du konceptoj klare manifestiĝis antaŭ la unua mondmilito, kiam venis nova generacio de pupteatristoj. Ekaperis la gazeto Ĉeĥa Pupartisto, la unua faka puparta gazeto en la mondo; anstataŭ marionetoj kaj dekoracioj importataj el eksterlando oni produktas proprajn laŭ prospektoj de ĉeĥaj artistoj.

La ekesto de la ĉeĥoslovaka ŝtato /1918/ signifas komencon de la "ora tempo" de la amatora puparto, kiu kulminis en la tridekaj jaroj. En Ĉeĥoslovakio aktivis ĉirkaŭ tri mil pupteatroj, el kiuj plejparto apartenis al la gimnastikaj asocioj: en 1933 Sokol havis 925, Orel 165 kaj laboristaj gimnastik-asocioj 187 teatrojn. Ankaŭ en lernejoj laboris multaj pupteatroj aktojentaj por la publiko. La absoluta plejparto de ili uzis pupojn sur fadenoj - marionetojn, sed poste ĉiam pli oftas gantpupoj, precipe en programoj por plenkreskuloj. La kulminon de sia populareco atingas Pulcinelo /Kašpárek/. La majoritato de marionetistoj ne sekvas altajn artajn celojn, sed nur teknikajn novaĵojn kaj manlertecon. La gvidantoj de la movado komencas kritiki tian nekreivan sintenon. /Finota/

Ĉi-jare la 26-an de junio estus ĝisvivinta 55 jarojn
s-ano Jan S a i n e r ,



la iama astro de la oficejo de ĈEA kaj tajpinto de Starto. Pragaj esperantistoj bone memoras lin, lian laborem, per kiu li kune kun aliaj riparis kaj ordigis la ejon de la kluba biblioteko dum sia libera tempo, kaj poste fariĝis kompleza bibliotekisto. Post kiam en la ejo instaligis la oficejo de ĈEA, li akceptis postenon en ĈEA kaj fariĝis estro de la oficejo. Tiam li jam tajpis Starton. Fine, post kelkvara laboro en ĈEA, li transloĝiĝis el Prago, sed loĝante en Cvikov li bonvole tajpis plu Starton kaj ankaŭ aliajn publikaĵojn. Lian poseperantan laboron subite interrompis lia morto: li forpasis la 10-an de aprilo 1965 post mallonga, sed peza malsano. La unua pasintjara numero de Starto estis la lasta, kiun li tajpis.

Ni rememoras lin kun estimo.

red-

Duonjarcento de la Moskva metroo

Moskvo, la ĉefurbo de Sovetunio, lastjare rememoris jam kvindekan datrevenon de post kiam oni komencis trafikon sur la unua linio de la nuna subtera fervojo. Elstaraj etapoj de ĝia historio estas karakterizataj per jaroj: 1931 - la junia plennombra kunveno de CK TKP/b/ pritraktis problemojn de la urba trafiko kaj decidis konstrui subteren fervojojn; 1932, 1933 - konstruo de la unuaj esplorsektoj kaj propraj tuneloj; 1934 - la 15an de oktobro je la 8a horo kaj 20 minutoj traveturis la unua provtrajno, konsistanta el du vagonoj linion inter stacioj Komsomolskaja kaj Sokolniki; 1935 - la 15an de majo je la 7a horo oni lanĉis publikan trafikon sur la unua, 11,6 km longa linio inter stacioj Sokolniki kaj Parko de kulturo /entute 13 stacioj/; la unuan tagon oni transportis 350 mil pasagerojn; 1939-1940 - estis konstruataj la dua kaj tria linioj, oni konstruis naŭ novajn staciojn de la metroo; 1952 - en la nuntempa stacio Lermontovskaja oni lanĉis la unuan turniketon; 1955 - laŭ decido de la prezidio de la Supera Soveto oni nomigis la metroon je la memoro de V.I.Lenin per lia nomo; 1981 - oni alirebligis muzeon de la Moskva metroo.

Nuntempe la Moskva metroo longas 203,4 km kaj havas 126 staciojn. Dum duonjarcento oni transportis pli ol 60 miliardojn da pasageroj, la metroo nuntempe plenumas 41,9 % de la tuturba trafiko, rapido altigis 1,5 foje, intervalo inter trajnoj mallongigis 3,5 foje kaj nuntempe ĝi estas 80 sekundoj.

En Sovetunio oni havas ankaŭ aliajn subterajn fervojojn: en Leningrad de post 1955, en Kiev de post 1960, en Tbilisi de post 1966, de post 1967 en Bako, de post 1975 en Ĥarkovo, 1977 en Taŝkento, de post 1980 en Erevano kaj de post 1984 en Minsk.

Kompilis Jindřich Tomíšek

CK TKP/b/ - Centra Komitato de Tutrusia Komunista Partio /bolŝevikoj/

Kiel oni vojaĝas per trajno en Svedio

La svedaj trajnoj estas antaŭ ĉio puraj, rapidaj /500 km dum malpli ol 5 horoj/ kaj gustatempe trafikantaj. Se venta trombo detruas la troleon, la svedaj fervojistoj ŝenprokraste anstataŭigas trafikon en nĉtrafikebla parto per autobusoj kaj tiamaniere pasageroj ĉiam gustatempe alveturas ekzemple al la haveno antaŭ ekveturo de sia ŝipo. La konduktoro scias, kie kaj kiam oni devas ŝanĝi la trafikilon. Okazis al mi foje, kiam la trajno malfruigis, ke alvenis la konduktoro kaj informis

liaj gazetoj, pri kiuj temas en la romano. En la teksto de la romano estas pri tio ankaŭ klarigoj, sed por simpla /kaj nebulgera/ leganto ili estas nesufiĉaj. Traduki esperantlingven la titolon kaj skribi iom pri la enhavo /temo kaj particeco/ de la gazeto estus nedomaĝe, sed pli bone por kompreni la aferon.

Kaj nun mi venas al la lasta punkto de mia kritiko pri la eldono de la koncerna libro. Temas pri supersignoj, neuzataj en Esperanta ortografio, kiuj tamen trovigas /kaj eĉ svarmas/ en la teksto de la libro. Ekz.: /s/, /aga/, /aga/. Menkas klarigo, kiel legi kaj elparoli /prononci/ tiujn signojn. Kial ili estas uzataj? Eble bulgaroj komprenas ilin, uzante ilin generale por transskribi la vortojn el azbuko /cirila skribo/ al latina alfabeto, sed por aliaj legantoj /kaj eble ankaŭ por francoj, en kies lingvo la uzitaj supersignoj trovigas, sed havas alian signifon en alie ortografie sistemigita lingvo/ ili estas tute neklaraj. Sufiĉus aŭ senigi la tekston de ili aŭ /se tion la redaktoroj konsideras utilaj/ lasi ilin kaj fari klarigon en aparta alineo pri tio.

Per ĉiuj miaj kritikaj vortoj mi tiel tute ne volus kondamni la redakcion kaj la eldonejon de la libro. Mi ne malbone, sed tre bone juĝas ilian laboron. Krom tiuj miaj rezervaj rimarkoj mi konsideras la Esperanton bona kaj bonstila kaj mi taksas la tradukon legebla kaj komprenebla, ĉar tie ne troviĝas novaj vortoj /neologismoj/, kiujn oni ne povus trovi ekz. en PIV. Kaj tio estas tre valora de la vidpunkto de simpla leganto, eĉ komencanto. Ja jes, mi nur volis atentigi pri kelkaj mankoj aŭ eraroj per miaj kritikaj vortoj, cetere mi ne estas kompetenta kritikanto, sed simpla leganto, kiel mi ĉiam emfazas.

Sume: la libro plaĉis al mi kaj mi rekomendus ĝin por legado precipe al junularo esperantista, sed ankaŭ al ĉiuj aliaj legantoj. Acetu ĝin kaj legu, aŭ se ne trovigas plu en libra merkato: pruntu ĝin kaj legu. Vi ne bedaŭros! Ĝi estas vera juvelo kaj ĝi vicigas inter la plej elstaraj historiaj romanoj de mondo: ekz. de Victor Hugo /francĵaj/, Alois Jirásek /el ceha historio/, Mór Jókai /el la hungara literaturo/, Henryk Sienkiewicz /pri la pola historio/, Walter Scott /el la historio angle/ kaj multaj aliaj monde rekonitaj. Ili formas parton de la trezoro de la monda historia beletristiko. La libro estas dika, sed legiva, la tragedia fino impresema /mi eĉ ne detenis larmojn, legante pri la tragedia morto de du junaj protagonistoj, ĉar la romenherooj estis proksimaj al mia koro kun sia liberiga strebado/.

Kaj ankaŭ kelkaj vortoj pri la ekstera aspekto: bindo tola, firma, bona - la speco de papero sufiĉa, tamen ne unuaklasa. Se estus bildoj /ilustraĵoj/, la libro estus ankoraŭ pli alloga, precipe por esperantista junularo. Sed tio dependas ne nur de la eldonistaj ebloj, certe ankaŭ la trakalkulo de la prezo tion influas, ĉu tio konsiderinde ne altigus la prezon, la manĉoj kompostadaĵ ne malhavigas, sed ili ne estas multaj /la preseje korektisto regas sian laboron/. La libro estas vere bona kaj bonaspekta.

Sonja Zedníková

Ni recenzas

Ivan Vazov: Sub la jugo. Romano en tri partoj el la vivo de la bulgaroj en la antaŭjaro de ilia liberigo el la turka jugo. Trad.: S.Hesapčiev k.a., red.: S. k. K.A.Simeonov. Sofio, BEA 1959.

Mi volas skribi kelkajn vortojn pri la libro de I.Vazov "Sub la jugo", kiun mi ricevis kaj ĵus nun tralegis.

La romano el la vivo de la bulgaroj en la tragedia jaro, kiam ili celis liberigi elsub de turka jugo, tre placis al mi kaj mi ĝojas, ke mi tiel, pere de ĝi, en la tre amuza kaj aventurama formo, konatigis kun tiu ĉi grava evento el historio de Bulgario.

Frave diras la antaŭparolo de prof. Dinekov, ke la romano - dika, sed kaptiva - estas tre alloga por leganto. Ĝi parolas pri la aŭtoro, elstara bulgara klasika verkisto I.Vazov, indikas la jaron de unua eldono - kaj tiel kontentigas la leganton pri la signifo kiel de aŭtoro tiel de la verko - sed ĝi neniel indikas la datojn de la "turka jugo" kaj tiel la leganto - nekonsenta bulgaran historion - ne estas bone informita pri la epoko, en kiu trairis tiu periodo. Ĉar ekster bulgaroj la legantoj ofte havas nur nebulajn sciojn, kiam tiu erao komencigas kaj kiam ĝi finiĝas.

Plue mi ankaŭ volus, ke estu aldonita mapo geografia - la landkarto de Bulgario, almenaŭ nur skema, kie estas signitaj per punktoj aŭ nigraj streketoj la lokoj, pri kiuj temas en la libro, ekz. Bjala Ĉerkva, Panagjuŝte, St. Plaŝina k.a. Ne ĉiu nebulgaro havas ĝin por dispono ĉemane, almenaŭ ne tiom detalan landkarton li povas havigi al si, por ke li havu eĉ supraĵan imagon, kie la lokoj, en la libro traktitaj /eble nur tusitaj/ troviĝas. Ili ankaŭ estas konsiderinde multaj.

Tie ankaŭ troviĝas multaj fenomenoj de popolaj moroj kaj de bulgaraj nomoj, kiujn ekster bulgaroj neniu konas. La popolaj moroj almenaŭ iam kaj iom estas klarigitaj. Per asteriskoj ili estas signitaj en la teksto kaj la klarigoj troviĝas en la fino de la libro. Tamen la eksplikoj ŝajnas al mi ne sufiĉaj. Pri la nomoj - personaj nomoj de bulgaroj - estas tiaj eksplikoj nenie. Ekz. mi trovis kelkajn nomsangojn /dubligitajn nomojn/ kaj ne scias, ĉu temas pri la samaj personoj aŭ ne: ekz. Rada - Radka, Lala - Laika, Anika - Anicka k.

m.a. Ankaŭ mi havas aliajn demandojn pri la personaj nomoj. Mi trovis nomojn kun finaĵoj: -co /Bojco/, -ko /Marko/, -ju /Kratju/ k.a. Ĉu la finaĵoj havas specialan signifon, ekz. ĉu ili estas nur viraĵoj, ĉu ili signifas "hejman" /karesan/ formon de alia /plena aŭ oficiala/ persona nomo?

Ankaŭ same estas pri finaĵoj de aliaj nomoj, kiujn mi su-

pozas familiaj, ekz.: -ov /Ivanov/, -ev /Kraličev/, -iĉ /Kraliĉ/ ktp. Ĉu ili estas vere familiaj nomoj aŭ patraj /aŭ ĉu nur patraj?/ nomoj? Ĉu ili signifas virseksojn? Ĉu ekzistas alia ina formo kaj ankoraŭ alia formo, kiu signifas la tutan familion?

Kaj ekz. ĉu Kraličev kaj Kraliĉ estas la sama persono? Oni povas supozi tion laŭ la romano, sed ne certe. Kial do oni uzas du malsamajn formojn? Ĉu oni povas uzi en Bulgario du formojn de familiaj nomoj oficiale?

Aliaj ekzemploj: finaĵo -ca, -ica /Avramica/ - ĉu ĝi signifas, ke temas pri edzino aŭ pri filino de Avram /resp. pri ambaŭ ebloj?/

Kaj: -ova /Ivanova/ - ĉu temas pri familia aŭ patra nomo pri virino? Ĉu ĝi estas **oficiala** formo?

Mi ankaŭ legas ĵurnalon "Bulgara Esperantisto" kaj ĝi plaĉas al mi. Mi rekomendus, ke tie estu plu loko por tiaj aferoj, kiujn mi demandas en pli supraj linioj. Oni devus presigi artikolon tiuteman. Klarigi la sistemon de bulgaraj nomoj. Mi estas certa, ke ĝi estus instrua por ĉiuj nebulgaraj esperantistoj kaj helpas al ili orientigi inter bulgarioj /almenaŭ pli bone ol nun, kiam ili estas neinformitaj/, kiam ili venas al Bulgario turisme aŭ kun Esperantistaj celoj.

Kompreneble, ke en la romano troviĝas ankoraŭ aliaj nomoj, kiujn mi supozas turkaj aŭ grekdevenaj, ĉar tiuj logantoj vivis kaj vivas en Bulgario. Ekz. /el la libro/: Mikelaki /ĉu greko?/ kaj Rasul /ĉu nomo de turko?/

Nu, kiel mi jam skribis: estas klarigoj sub asterisko en fino de la libro. Sed tiuj eksplikoj estas tute ne sufiĉaj. Ekz.: la listo de la vortoj ne uzas konsekvence la ordon de la Esperanta alfabeto, tie post Ermitaj-muzeo sekvas La gastejo de Kakerne, poste Maŝallah kaj tuj poste Geĉmis ola. Ŝajnas, ke la redaktoro intermiksas tie du malsamajn vidpunktojn de alfabetado /alfabeta vortordo/, ĉar oni aŭ entenas la artikolon la kiel bazan vorton kaj ĝin tiel listigas aŭ oni neglektas la artikolon.

Ekz. la listo ne ĉiam koincidas ĉe la asteriske signitaj vortoj en la teksto - la vorto uzata en la teksto kun asterisko ne troviĝas en la libra malantaŭa listo: vidu pg. 18 - tuta kan ano

pg. 26 - Balkano
pg. 61 - kalevra
pg. 75 - gospoja } ne estas klarigoj surfine /eĉ ne en la teksto surpiede de la koncerna pago/
ktp. sur aliaj pagoj de la libro.

- en la teksto ne estas konsekvence uzata la asterisko ĉe la koncernaj vortoj: aŭ iam oni signas per asterisko la samajn vortojn kelkfoje sur malsamaj pagoj /superflue/, aŭ oni ne metas ĝin eĉ unufoje /kaj iuj vortoj do restas tiel por la leganto enigmoj/.

Laŭ mia opinio oni devas meti la asteriskon konsekvence: t.e. nur tiam, se la vorto aperas unufoje kaj ĉiam ĝin klarigi ĉe la listo ĉefina.

Mi ankaŭ opinias, ke estas necese fari liston da titoloj de bulgaraj ĵurnaloj, eble ne nur bulgarlingvaj, sed ankaŭ a-

ke mi devas veturi parton de la vojo per taksio, kiun senpage prizorgis la fervojo. Ni estis sume dek du, oni enaŭtigis nin kune kum valizoj en du pli grandajn taksiojn. La soforo lerte kaj rapide veturigis nin kaj tra malpli longa vojo li alveturigis nin en alian stacion, kie ni laŭhorare estus transtraj-nigontaj kaj tiamaniere ni gustatempe povis deŭrigi nian vo-jagon. Post traveturo de 200 km ni devis denove elvagoniĝi - oni riparis la trakon kaj ni pasageroj estis transportataj per autobusoj. Por kompensi nin pro neagrabla transtrajniĝa-do oni donis al ni senpagan aŝignon por refreŝigaĵo, kio es-tis bonvena precipe por ni ĉeĥoj, ricevintaj por la voĵagado ne tro altan posmonon.

Refreŝigon oni povis ricevi en Svedio en trajno en pasa-gerwagono aŭ en stabila kiosko entrajna aŭ de la mangoveturi-letto, veturanta tra la tuta trajno. En malmulte enlogataj re-gionoj, kie trafikas nur duvagonaj trajnoj, vendas kafon la konduktoro.

En meza kaj precipe norda partoj de Svedio, kie oni ve-turas dekojn da kilometroj tra arbaro ol oni povas vidi iun logdomon, la konduktoro per trajna laŭtparolilo anoncas diver-sajn priregionajn informojn. Pro komplezo al la voĵagantaj fremdlandanoj li ripetas siajn informojn ankaŭ en angla ling-vo, do ekzemple kapoj de la voĵagantoj turnas sin dekstren, kiam li anoncas: "Aro da nordaj cervoj dekstre de la trako." Ĉe kiam oni voĵagas per rapidtrajno, ĝi haltas dum mallonga tempo apud elstaraj objektoj, ekzemple apud grandega valbaraĵo kaj kompreneble je arkta cirklo, kiu estas simbolo pentrita per larĝa blanka strio; tie ĉi plej multaj fremdlandanoj el-trajniĝas por foti sin apud tabulo kun surskribo "Arkta Cir-klo" en diversaj lingvoj.

Kompreneble tio estas ebla ankaŭ dank' al trafikdenseco nekompereble diferenca de trafikdenseco ĉe multaj ĉefaj eŭro-paj fervojlinioj.

/Laŭ rememoroj de la partoprenintoj/ esperantigis
Jindřich Tomíšek

En la lernoĵaro 1985/86 sukcese finis la korespondan kur-son de Esperanto ĉe kursestrino H. Struncová jenaj kursanoj:

Jan Tichý, Nový Bor, 1. máje 811
Jana Jiroušková, Praha 3, U kněžské louky 6
Ing. Vladimír Dvořák, Praha 9, Zelenečská 354
Jana Králová, Ostrov, Palackého 29
Ing. Miroslav Trojan, Praha 4, pošt. příhr. 96
Dagmar Vobrátilková, Praha 7, Fr. Křížka 14
František Furka, Praha 3, Lucemburská 42
Leona Macháčková, Praha 4, Lomnického 3
Ludmila Křesinová, Praha 9, Litvínovská 523
Ing. Ludvík Veselý, Praha 9, Litvínovská 527/40
Radka Kybová, Ondřejov 144
Helena Dobrá, Praha 8, Prosecká 7
Květa Makovcová, Praha 9, Travná 1201
Zdeněk Milík, Praha 10, Arménská 3

Al ĉiuj ni kore gratulas!

UTILECO, NE VENKO

Miroslav MALOVEC

En BI 7/86 ekinteresis min la artikolo de Tibor Papp "Konferenci, simpozii.... aŭ agi?", kiu parolas pri la vojo al la venko de Esperanto. Mi opinias, ke ĝuste la vorto kaj ideo "venko" estas unu el la plej gravaj obstakloj por akceptigi Esperanton. Parolante pri la fina venko de la Internacia Lingvo ni fakte prezentas al la publiko celon, kiu tute nature devas al la plejparto de neesperantistoj saĝni kiel nereala utopio, ĉar ili ne kapablas imagi, ke tia artefarita lingvo, sporade parolata /kaj ofte nur balbutata/ de nemultaj hobiuloj, povus anstataŭi potencajn naturajn lingvojn, kiel la angla, franca, rusa k.s., kiuj estas firme ligitaj kun la ĉiutaga vivo kaj laboro en nenombreblaj profesioj kaj tiamaniere ankaŭ kun la ekonomioj de ĉiuj statoj. Tial ili malrespekte deturnas sin de ni, vidante en ni nur naivajn fantaziulojn, kiuj ne kapablas pensi realisme. Se ni volas akiri la konfidon, respekton kaj precipe helpon de la publiko, ni devas prezenti al ĝi tiajn celojn, kiuj ankaŭ al la neesperantistaro povas saĝni realigeblaj.

Por nia movado pli gravas aktiva helpo de "nekredemaj Tomasoj" ol senfrukta fantaziado de ortodoksaj konvikitoj. Mi konas homojn, kiuj malgraŭ sia skeptikeco helpas kaj subtenas nian movadon, kaj homojn, kiuj sian entuziasman kredon opinias sufiĉa kontribuo al la ideo kaj faras nenion alian, eĉ la lingvon mem ili ofte ne finlernas. Tamen, Esperanto ne progresas per promesplenaj fantazioj, sed per ĉiutaga, formika laboro de tiuj, kiuj ne multe cerbumas pri la fina venko, sed **klopodas** pri pli proksimaj celoj, kiel pri pretigo de vortaroj, lernolibroj, gazetoj, libroj, kursoj, seminarioj ktp.

Persvadi la publikon pri la fina venko de Esperanto ne havas sencon, ĉar tia imago estas por tiu publiko nekredbla kaj nedigestebla. Sed ni povas konvinki ĝin, ke Esperanto estas kaj ĉiam restos utila lingvo, sendepende de tio, ĉu ĝi venkos aŭ ne. Eĉ se la angla kaj ceteraj mondlingvoj konservos sian ĉefan rolon en la internacia komunikado, ĉiam restos en la mondo centmilionoj da personoj, kiuj ne kapablos interkomprenigi per ili, ĉar tiuj lingvoj estas tre malfacilaj. Esperanto do ĉiam havos sufiĉan spacon por esti aplikata, eble nur kiel apuda, duaranga mondlingvo, sed fare de milionoj da homoj, kaj tia lingvo ja ne estas senbezona, eĉ se ĝi ne estos la plej grava. Anstataŭ dependigi Esperanton de ĝia venko, ni dependigu ĝin prefere de ĝia utileco, ĉar tute ne estas certe, ke ĝi iĝos "dua patrolingvo por ĉiuj", sed estas certe, ke eĉ sen tio ĝi estos utila.

Ni povas tre facile klarigi, kial Esperanto ĝis nun ne atingis tiun "sufiĉan" utilecon: ĝi travivis sian lingven infanagon kaj nun ĝi iĝis adoleskanto. Dum la pasintaj cent jaroj Esperanto evoluigis sian komunuzan kaj beletran stilon, adaptante sian vortprovizon al la ĉiutaga vivo, majstre priskribita precipe en beletraĵoj, sed nuntempe ĝi tralaboras cefe sian fakan stilon kaj preparas **terminarojn**, sen kiuj Esperanto kompreneble ne povis esti suface vaste aplikata en profesioj. Atendas nin multe da laboro: miloj da terminaroj, teknikaj vortaroj Esperantaj-nacilingvaj, lernolibroj por specialistoj, veraj montoj da fakaj literaturaĵoj. Ĝis nun Esperanto estas lingvo de hobiuloj, ne de homoj, kiuj bezonas interkomprenigi pri sia laboro. Tio devas ŝanĝiĝi, se nia movado volas fari grandan paŝon antaŭen. Poste lernos ĝin pli da homoj kaj pli diligente, la komunikataj informoj havos pli gravan /ekonomian/ signifon. Do ni povas prave atendi, ke la graveco de Esperanto en la futuro konsiderinde kreskos, ke ĝi fariĝos minimume unu el la signifoplenej mondlingvoj. Tamen, kiu povas scii, ĉu ĝi vere igos la ĉefa mondlingvo? Troigado de niaj aspiroj ne helpas, sed grave subfosas nian laboron. La publiko ekkredos pli al negranda, sed realisma tasko ol al granda utopi-aspekta revolo. Ni do ĉiam emfazas kreskon de la utileco de Esperanto en la futuro, ne ĝian venkon super aliaj mondlingvoj.

Ne paroli pri la "venko" ne signifas, ke ĝi ne povas okazi. Male, ĝi proksimiĝos pli rapide, se ni ne fortimigos per ĝi la publikon.



La ŝtata blazono de Ĉeĥoslovakio, valida ĝis la jaro 1960 - la t.n. "malgranda blazono".



La ŝtata blazono de Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko, valida ekde la jaro 1960.



heraldiko _____ _____ veksilologio

La forpasinta membro de la redakta komitato de Starto s-ano Jaroslav Klement estis fakulo pri heraldiko kaj veksilologio. Li estis aŭtoro de verko "Heraldiko-veksilologio-terminaro en Esperanto". Lia deziro estis, ke en Starto aperu regula rubriko pri heraldiko kaj veksilologio. Por honoro la memoron de s-ano Klement ni nun malformas la novan rubrikon.

ŜTATAJ BLAZONOJ

Kvankam la ŝtata heraldiko apartenas ĝis nun al la vivantaj specoj de heraldiko, ĝia uzado en la klasika koncepto malgrandigis kaj la ŝtataj blazonoj en multaj kazoj cedis al la ŝtataj insignoj de suvereneco. La ŝtata blazono, eĉ se ĝi devas respondi al ŝtataj rilatoj, devas submetiĝi ankaŭ al la reguloj de la heraldiko. Sed eĉ en la tempoj de la disvolvigo de la heraldiko oni ne ĉiam atentis tiun ĉi regulon; ni rememoru la imperiestron Napoleonon I. en Francio, kiu sangadis la absolutismajn formojn kaj la reĝan heraldikon li anstataŭigis per aparte laŭskema imperiestra heraldiko.

Kiam ni observas la esprimojn de la nuntempa ŝtata heraldiko, ni konstatas, ke vico da ŝtatoj kaj vico da konsilantoj de iliaj plej altaj reprezentantoj ne zorgas pri la heraldikaj reguloj. La videblaj simboloj de ilia ŝtata suvereneco ne plu apartenas en la heraldikon, kio validas pri la plimulto de ŝtatoj nove estigintaj aŭ kun sangita formo de la ŝtata reĝimo. La ekzistado de la heraldiko ili negas jam per tio, ke ili rifuzas uzi la fundamentan formon de la heraldiko - la ŝildon, kaj la proprajn ŝtatsimbolojn ili esprimas malakorde kun la heraldikaj reguloj, ĉu temas pri la kutimaj koloroj, formoj aŭ arango.

Seĝ aliflanke ni povas konvinkiĝi, ke ĝis nun ekzistas multaj ŝtatoj, kiuj ce la **vidigado** de la simboloj de sia suvereneco eliras el la tradicioj kaj formoj akiritaj de iliaj historiaj sortoj. Temas generale pri la ŝtatoj, sur kies historia grundo la heraldiko plej profunde enradikiĝis kaj en kiuj dum jarcentoj ĝi trovis favorajn kondiĉojn de la disvolvigo. Tiaj ŝtatoj estas ekz. Grand-Britio, Norvegio, Svedio, Federacia Respubliko Germanio, Belgio, Aŭstrio, Islando, Luksemburgio, Danlando; firme inklina al la heraldika tradicio Svislando, kaj nome ne nur per sia ŝtatblazono, sed ankaŭ per la nombro de blazonoj de siaj kantonoj. El la ŝtatoj kun la socialisma ordo konservas la tradician enhavon de la ŝtata blazono precipe Pollando kaj Ĉeĥoslovakio, kvankam ili akomodis ĝin al la nova koncepto de sia ŝtata formo. Ankaŭ vico da trans-

maraj ŝtatoj /Aŭstralio, Somalio, Kanado, Nov-Zelando/ uzas heraldikajn formojn en la ŝtataj blazonoj, kiuj estis ĝenerale derivitaj el la modeloj de la klasika eŭropa heraldiko. Japanio ĝis nun uzas sunon, la klasikan figuron de sia tradicia heraldiko.

La origina blazono de la ĉeĥa ŝtato estis nigra aglo ĉirkaŭata de ruĝaj flamoj sur argenta fono. Ĝi estis emblemo de Přemysl idoj, pli poste nomita sanktveneslao aglo. Tiu ĉi nomo estas historie malgusta, ĉar en la tempo de la princo Sta Venceslao, kiu mortis verŝajne en la jaro 929 aŭ 935, en nia lando la heraldiko ankoraŭ ne estis disvolvita, ne konsiderante tion, ke en tiu tempo la ĉeĥa lando ne estis ankoraŭ ŝtature unuiginta kaj kunfandiginta. La blazonbildo de aglo signifas la feŭdan dependon de la Roma imperio, simile kiel la aglo en blazonoj de aliaj elektorlandoj, markgraflandoj kaj duklandoj. Inter la pli postaj landoj de la ĉeĥa krono la aglon havis ankaŭ Moravio kaj Supra kaj Malsupra Silezioj.

Kutime oni rimarkigas, ke la blazonon de la leono skiris la batalema Vladislao II., kiu en la jaro 1147 partoprenis la duan krucan militiron, kiu ne finigis tro bonŝance. En la jaro 1158 li estis invitita partopreni la militekspedicion de imperiestro Frideriko kontraŭ la lombardiajn urbojn, kiuj rifuzis obeemon al la imperiestro. Por ke li estu varbita, en la regna kongreso en Regensburgo li estis samtempe proklamita reĝo. Lia heroco ĉe Milano tiom impresis la imperiestron, ke li havigis al la ĉeĥa reĝo anstataŭ ĝistiamsa aglo novan blazonfiguron, argentan leonon "kun unu vosto" kun ora armaĵo sur ruĝa fono. Tiel rakontaŝ kronikisto Dalimil kaj lian sciigon dokumentas ankaŭ la ĉeĥaj denaroj el la dua duono de la 12-a jarcento, sur kiuj ankaŭ aperas la bildo de la kronita leono. En la jaro 1212 estis la hereda reĝa titolo konfirmita al ĉeĥaj reĝoj per Ora Buleo Sicilia. Dum la regado de Přemysl Otakar I. /de 1197 ĝis 1230/ oni plibonigis la blazonon tiamaniere, ke la leono skiris duan voston kaj en tiu ĉi bildo de supernatura besto ĝi poste restis dum vico da jarcentoj.

La duvosta leono konservigis en la aŭstra blazono dum la regado de Habsburgoj, kiuj ĝin en la korsildeto metis sur la bruston de la imperiestre dukapa aglo, kaj ankaŭ en la periodo post la liberigo en la jaro 1918, kiam ĝi ricevis pluan plibonigon en formo de korsildo de Slovakio kun argenta duobla kruco sur blua trimonto sur ruĝa fono. La germana okupacio ĝin ree senigis de la slovaka plibonigo en la jaro 1939 kaj transprenis la ĉeĥan leonon kune kun la moravia ruĝe-blanke ŝakumita aglo sur blua fono en alternan blazonon de Protektorato.

Post la liberigo de Ĉeĥoslovakio fare de la soveta armeo en la jaro 1945 la ŝtata blazono denove estis uzata en la formo, kiun donis al ĝi la popolo post la jaro 1918. En la jaro 1960 ĝi estis nove aranĝita: la leono sen la kroniademio estis lokita sur popola sildo, anstataŭ la diademio ĝi ricevis kvinpintan ruĝan stelon kun ora bordero, lokitan en la spaco super la kapo. Sur la brusto estis lokita nova blazono de Slovakio kun blua silueto de Kurbmonto kaj ora silueto de bivekfajro sur ruĝa fono. /Lau Z.M.Zenger tradukis J.F./



KORESPONDDEZIROJ ANONCOJ

Nova esperantisto, 19-jara lernanto interesigas pri literaturo, sporto kaj karateo: Leszek JACHNIK, PL-63-205 SLAWOSZEW, woj. Kaliskie, Pollando/Polaka.

27-jara ingenierino interesigas pri turismo, literaturo, kolektas turismajn prospektojn kaj fotoalbumojn: Grazyna KAPICA, str. Rogowska 94/5, 54-440 WROCLAW, Pollando.

20-jara lernantino interesigas pri turismo, literaturo kaj folkloro kaj kolektas postmarkojn: Agata KOŠMIDER, str. Rzemieslnicza 2/15, 59-220 LEGNICA, Pollando.

Esperanta klubo en Norilsk, USSR, deziras korespondi tutmonde laŭ diversaj temoj, kolektas bildkartojn: USSR, 663 301 NORILSK, Ul. Lenina - 9, Esperanta klubo "Norda stelo".

Instruistino de fremdaj lingvoj /la angla, hispana, ĉeĥa/ kaj Esperanto satas okupiĝi pri la porpaca E-laboro. **Si volas** korespondi kun iu pregano aŭ almenaŭ ĉeĥoslovakiano: USSR, SU-252 035 KIEV - 35, ul. Urickogo d. 19 kv. 73, Svetlana POGORELA-JA

Dorothea KAISER, Wenzelstr. 12, ALTENBURG, GDR 7400 kolektas bildkartojn pri ĉi-aj trafikiloj, ĉion pri bano kaj maro.

28-jara finna fraŭlo dezirus korespondi kun 18-23jaraj knabinoj, kiuj interesigas pri Esperanto aŭ lernas ĝin. Lia adreso: Tapani Lappalainen, Kivalakotikylä, SF-37500 LEMPÄÄLÄ, Finnlando.

Liaj intereso: aŭskultado de muziko, filatelo, kolektado de bildkartoj, de eksterlandaj moneroj, de fremdlingvaj muzikkasetoj, de poŝtmarkoj, korespondado kun knabinoj, legado, lingvoj angla, Esperanto, germana, itala, rusa, sveda, numismatiko, sportoj: biciklado, naĝado, promenado, li satas modan kanten kaj religian muzikon de gejunuloj. Se vi volas, vi povas sendi foton, sed ne devas.

Brazilano, lernanto de elektrolernejo volas koni la E-movadon en Ĉeĥoslovakio kaj estas scivolema pri nia lando, tial li volas leteri kun ĉeĥoslovakej esperantistoj: Roberto da Silva Ribeiro, Edmundo Pereira de Assis 300, CATOLÉ CAMPINA GRANDE PB, 58100 Brasil

Presistoj kaj preslaboristoj atentu! Nova sekcio de presistoj-esperantistoj estas fondata. Skribu al: Vilmos Bacsa, P. O. B. 96, H-5700 GYULA, Hungario.

Rondeta vivo



● La plej malnova Esperanto-Klubo en la centra Eŭropo, la Esperantista Klubo en BRNO, celebris en oktobro 1986 la 85-an datrevenon de sia fondiĝo. La fondintoj de la klubo estis deputito Josef Hybeš, redaktoro de laborista ĵurnalo *Dělnické listy* Karel Pelant, Václav Kovanda kaj Jan Kajš. La Esperantista Klubo en Brno apartenas al la plej grandaj kaj plej gravaj kluboj en nia lando kaj per la membronombro, kaj per sia aktiveco kaj longjara tradicio. Por siaj membroj kaj por propagandi en la neesperantistaj medioj la klubo eldonas informričan nacilingvan Bultenon. La klubkunvenoj okazas ĉiumarde de la 19.30 ĝis la 21.00 horo en Klubo de edukado kaj scienco en Leninova strato 34. Ekde la 7-a de oktobro oni aranĝas kursojn por komencantoj kaj progresintoj. La 14-an de oktobro okazis solena koncerto honore al la 85-a datreveno de la Esperantista Klubo en Brno, sub artisma gvido de prof. H. Halířová.

● Inter la 9-a kaj 11-a de majo 1985 okazis en Budapeŝto plua tradicia B-B-B-Renkontigo, kiun partoprenas esperantistoj el Brno, Bratislava kaj Budapeŝto. El Brno venis 12 membroj, el Bratislava 20. Dum la Renkontigo oni partoprenis pacmanifestacion kun arta programo en Esperanto, trarigardis Budapeŝton, vizitis nacian galerion, zoo-parkon, partoprenis dancvesperon ktp.

● Rezulte de skriba interkonsento de 21 membroj de diverslandaj naciaj sciencaj akademioj la 12-an de aprilo 1986 deklaris en Kopenhago la fondo de la INTERNACIA SCIENCA AKADEMIO KOMENTUS (ISAC). Ĝia sidejo estos en la sveda urbo Uppsala, ĝia prezidanto estas Paul Neergaard, membro de tri naciaj sciencaj akademioj.

Dum la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS) havas karakteron multe pli instruan ol sciencon, ISAC volas disvolvi sian agadon tute kaj nure por la servado kaj kultivado de la sciencoj, aplikante kaj prosperigante Esperanton por tiu ĉi celo.

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Jiří Hanousek (grafika aranĝo), Jaroslav Kašparec, Miroslav Malovec, Jiří Patera (responda redaktoro) kaj Helena Štruncová. Presas RUCH Liberec. Transdonita al la presejo la 30-an de septembro 1986. Jarabono 24 CSK, por eksterlando 36 CSK aŭ 10,5 NLG inkluzive de sendkostoj. Abonantoj turnigu al niaj perantoj, al UEA aŭ rekte al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 Praha 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: Jiří Hanousek (grafická úprava), Jaroslav Kašparec, Miroslav Malovec, Jiří Patera (odpovědný redaktor) a Helena Štruncová. Povoleno odborem kultury NVP č. 310008385 ze dne 18. 3. 1985. Tiskne RUCH, podnik ONV, Liberec. Předáno do tisku dne 30. 9. 1986. Dohlédací pošta Praha 07. Snížený poplatek za poštovně povolen Ředitelstvem pošt Praha pod č.j. P/1 - 1267 ze dne 6. 4. 1979.

Výtvarná řemesla

Praha

Vám nabízejí široký
sortiment bytových
doplňků a dárkových
a upomínkových
předmětů,
vyráběných převážně
v malých sériích
s častou inovací.

NABÍZÍME:

**SOUSTRUŽENÉ MOCCA SOUPRAVY
SOUSTRUŽENÉ ODKLÁDACÍ STOLKY
MALOVANÉ PORCELÁNOVÉ SOUPRAVY
I JEDNOTLIVÉ KUSY
MALOVANÉ A BROUŠENÉ VÁZY, MÍSY
A POPELNÍKY
VÝROBKY Z CÍNU**

**BIŽUTERIE KOVOVOU A KOŽENOU
A DALŠÍ SORTIMENT Z KOVU, KŮŽE,
KOŽENKY A TEXTILU**

Adresy prodejen upomínkových a dárkových předmětů:

110 00 Praha 1, Národní tř. 37	22 41 94
110 00 Praha 1, Vodičkova 28	24 47 71
110 00 Praha 1, Spálená 39	29 27 04
110 00 Praha 1, Na poříčí 35	23 17 315
110 00 Praha 1, Křížovnické nám. 2	26 63 28
120 00 Praha 2, Anglická 18	25 98 56
110 00 Praha 1, Lazarská 5	29 83 22
110 00 Praha 1, Železná 12	22 79 14
170 00 Praha 7, Obránců míru 17	37 44 84
110 00 Praha 1, Můstek – stanice metra	26 14 19
360 00 Karlovy Vary, Mariánská 2	930/28 381

Vzorkovna nábytku:

110 00 Praha 1, Václavské nám. 41 26 40 64

přijímá objednávky na individuální zakázky
nábytku a bytových doplňků.

**V našich prodejnách
naleznete
vhodné dárky
pro každou příležitost.
Naše pracovníce Vás
ochotně obslouží
a pomohou vybrat
předmět,
který potěší.**

Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10

NOVINY

Dohlédací pošta Praha 07
Snížený poštovní poplatek povolen
Ředitelstvím pošt Praha
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979